




Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 145, Decembro 2015**



GO en la 102a JAPANA Esperanto-Kongreso (JK)



La 102a JK okazis en la urbo SENDAI en la gubernio MIYAGI de la 10a ĝis la 12a de oktobro 2015.

Ĉirkaŭ 400 personoj partoprenis en la JK inkluzive moralajn partoprenantojn.

Okazis publikaj prelegoj en la japana lingvo, kies titoloj estas “Katastrofo kaj Esperanto” (nia reprezentanto s-ro Hori Jasuo prelegis), “UNESKO kaj Esperanto” kaj “Lu Sin kaj Eroŝenko”. Okazis ankaŭ multaj fakkunsidoj kaj prelegetoj en Esperanto.

Ni, JEGA, okazigis fakkunsidon de “Go-ludo” en la posttagmezo de la 11a, kie aliĝis 11 personoj. Vidu la supran mapon, kiu montras la urbon SEDNAI kaj la hejmlokojn de japanaj aliĝintoj kun la nomoj de la gubernioj. Ĉi tiun jaron, danke al la gastoj el Vjetnamio (Foto), en la fakkunsido oni ne multe krokodilis.

En la fakkunsido, unue mallonge okazis la ĝenerala kunveno de JEGA. En ĝi HORI Jasuo, la reprezentanto, raportis la agadon, agadoplanon kaj aranĝon de la estraranoj.



Due faritaj estas enkonduko al Go-ludo por komencantoj, ludoj inter lertuloj kaj komencantoj aŭ mallertuloj, kaj ekzercaj ludoj.

Trie SAKURAI Nobuo, la honora reprezentanto, kaj MORI Hitoŝi, la sekretario, ludis montradan partion altnivelan, kiun rigardis la aliĝintoj.

Ĉi-jare, inkluzive du junajn gastojn invititajn el Vjetnamio, ses virinoj aliĝis, kaj la kunsido estis tre vigla kaj gaja, sed bedaŭrinde mankas junaj viroj.

Mi esperas ke la komencantoj daŭrigos la lernadon de GOo aŭ per japanaj libroj aŭ per la



esperantaj libroj aŭ tradukaĵoj.

MORI Hitoŝi mori_kin@nifty.com


La 10a argentina Go-kongreso

Soraya Alvarez sooysoraya@gmail.com



La Argentina Go-Kongreso okazis ekde la 21a ĝis la 23a de aŭgusto. La kongreso daŭris tri tagojn, sed mi povis ĉeesti nur la du lastajn tagojn.

Okazis turniro pri Go-problemoj kaj poste Go-turniroj.



Mi eksciis pri Go en la pasinta jaro dum la 99a UK en Argentino. Post tio mi ne ludis persone, ĉar mi ne havis kunludanton, sed mi vere interesiĝis pri la ludo, poste mi eksciis pri ĉi tiu kongreso kaj finfine mi partoprenis en ĝi. Estis interesa sperto por mi konatiĝi kun aliaj go-ŝatantoj, kaj ĉiuj estis tre afablaj kaj bonŝance mi multe lernis. Mi ne partoprenis en la turniro, sed mi ludis libere plurfoje.



kun alia virino)

Dum la turniro partoprenis pli ol 20 homoj, kaj dum la prelegoj ĉeestis pli da homoj. La prelegoj estis diversaj, kelkaj por komencantoj, aliaj pri la Ĉina aŭ Japana historio/kulturo rilate al Go kaj aliaj montris partiojn. (Foto: Mi en la mezo ludis



(maldekstre) Prelego pri la “partio de la atombombo”, kiu okazis en 1945 dum la dua mondmilito en la urbo Hiroŝima. Maldekstre staras Alejandro Aguilar (unu el la plej gravaj Go-ludantoj de Latinameriko, kiu estas 7 dan kaj venkis du foje al profesiuloj), meze la vicprezidanto de la Argentina Go-Asocio kaj dekstre Tomoko Aikaŭa, la ambasadorino pri paco de Hiroŝimo.

En la prelego pri universitata stud-subjekto “Filozofio kaj strategio de la ludo” oni instruis kiel ludi Go-n kaj ĝia graveco en la strategio. Oni montris kelkajn ekzamenojn de la gelernantoj.

Alia interesa fakto sed tiukaze rilate al Esperanto estas, ke la plejmulto da ludantoj sciis pri la lingvo, ĉar almenaŭ du oftaj ludantoj estas esperantistoj sed bedaŭrinde mi ne konatiĝis kun ili.

Letero

Kara, Koran dankon. Mi ricevis bonorde la paperan (kaj la interretan) version de Go-amiko n-ro 144. Mi tre valoras viajn sendojn kaj ili estas tre utilaj.

La 10a, 11a kaj 12a de oktobro 2015 okazos la Argentina Esperanto Kongreso en la provinco de Mendoza (ĉe Dorrego - Guaymallén), kie ni intencas ludi iomete go-n, kaj paroli publike pri la ludo... Mi alportos montran materialon, inter ili Go-amiko.

Bedaŭrinde dum la Universala Esperanto-Kongreso en Buenos Aires mi estis iom malsana, ĉeestis malmulte da programeroj, post la UK, jam pasinta, mi informiĝis pri via ĉeesto kaj viaj ludoj tie.

Nun mi apartenas al la Argentina Asocio de Go (AAGO) <http://www.go.org.ar>, info@go.org.ar. Mi jam partoprenis hispane dum la 10-a Kongreso Argentina de Go la 21an, 22an, kaj 23an de aŭgusto 2015. Kaj kelkaj membroj de la estraro petis min transdonu al vi la peton en Esperanto (ĉar ili ne scias Internacian Lingvon], ke bonvolu ŝanĝu la poŝt-adreson de paperaj sendoj de "Go-Amiko" al la nova sidejo, nome al la strato Santiago del Estero 952 -1° piso - Buenos Aires - P.C. 1075 - Argentina, ĉar oni tre interesiĝas pri via mirinda revuo.

Kore salutas vin tre dankeme,

Alfred Juan Valle alvalo22000@yahoo.com.ar

Dum la Argentina Esperanto-Kongreso en la provinco de Mendoza, mi parolis al la ĉeestantoj, informante pri la reguloj de go-ludo, kaj respondis multaj demandoj pri la temo. Bedaŭrinde la lokaj grupoj de goistoj tute ne aperis, nek respondis, kiel antaŭe estis koncertata per telefonvokoj kaj majloj. Malgraŭ ke ili esprimis, rete, intereson pri Esperanto, la internacia komunikado, ne donis signalon dum la kongreso, nek aperis, nek komunikis ion. Antaŭ la kongreso mi instruis iomete pri go al du samideanoj, sed ili ne vojaĝis al la kongreso.

Alfredo Juan Valle.

Dek kialoj por ne komenci ludi goon


Por la nova numero de “Go-amiko” mi tradukas artikolon, kiu aperis en la rusa reta revuo “Ogo”. Ĝia aŭtoro estas Maria Ĉaplina, junulino, kun kiu mi konatiĝis en la Siberia go-tendaro. Unue ŝi aperigis tiun artikolon en sia “vivĵurnalo”: <http://jason-din-alt.livejournal.com/433641.html>

La artikolo certe estas ŝerca, sed ĉiu ŝerco ja enhavas pecon de vero. Malgraŭ ĉio menciita en ĝi, ni daŭre ludas. Ĉion plej bonan al vi!

Efremov Roman javaharlalneru@mail.ru

1. Malgraŭ tio, ke la regulojn de tiu ludo vi povas lerni dum 10 minutoj, ĝia studado forprenos de vi multege da tempo, kaj ĝi neniam sufiĉos. Por unu serioza partio oni ofte elspezas pli ol du horojn. Ĉu vi planas ludi po kelkajn partiojn tage? Ne, goo estas ludo nur por tiuj, kiuj havas multe da superflua libertempo.
2. Vi povas akiri malutilan kutimon – pensi antaŭ ol fari ion, komputi variantojn en via kapo. Tio povas finiĝi malbone por via spontaneco.
3. Dum la ludo homoj fakte estas senmovaj. Se vi havas “sidan” laboron kaj elspezas multe da tempo en voj-trafiko veturante hejmen, ĉu ne estas pli bone elekti iun korp-aktivan ŝatokupon?
4. Goo igas vian cerbon streĉiĝi. Ŝajne tio ne estas distraĵo, kiu donos al vi malstreĉiĝon kaj ripozon, male – ĝi povas ege lacigi vin.
5. Ĉirkaŭantaj homoj verŝajne skeptike rilatos al via hobbio, des pli – kiam ili ekscios, kiom da tempo vi elspezas por ĝi, kaj kiu estas via perspektivo.
6. Interalie – pri la perspektivo. Se vi ne estas infano (aŭ ne komencis lerni la ludon ekde infaneco), ne loĝas en Ĉinio/Koreio/Japanio, do verŝajne vi neniam iĝos profesia ludanto. Kiom ajn diligente vi studus – via sorto estas resti nur amato. Tamen eĉ profesiuloj ne havas luksajn vivkondiĉojn: eblecon perlabori multe da mono havas nur tiuj, kiuj venkas en turniroj kaj gajnas titolojn.

7. Goo nepre donos al vi multege da malagrabla sperto. Seniluziiĝo kaj amaro de malvenkoj, kolero al vi mem pro eraro, furiozo pro malĝentila konduto de rivalo, sento de plena malespero en malvenka pozicio. Ĉiu ludanto almenaŭ unufoje ploris pri sia malgajnita partio. Kaj vi neniam ludos sufiĉe bone. Preskaŭ ĉiuj ludantoj diras pri si mem, ke ili ludas “ne tre bone”, ne gravas ĉu ili estas 5 dan aŭ 25 kju.



GO-LUDO

Pensu dufoje antaŭ ol komenci

8. Malgraŭ tio, ke ankoraŭ ne estas kreita komputila

programo, kiu povus superi homon en go-ludo, tio ne faciligos vian vivon. Ĉar temas pri ludo inter komputilo kaj profesiulo. Sed vin ege longe (eble ĉiam) sukcesos venkadi eĉ senanima kompilaĵo de nuloj kaj unuoj.

9. Se vi loĝas en Koreio, ludi goon tie estas vere danĝere. Ĉar se vi ludos bone, pri vi ekinteresiĝos korea mafio, igos vin ludi por mono, kaj via vivo post tio iĝos vere maldolĉa. Sed mallonga. (Spektu la filmojn “Ŝtono” kaj “Dia meto”)

10. Jes, go-ludo vere enhavas iun mistikon, enigmon, kaŝitan ĉarmon. Tion povas senti preskaŭ ĉiu komencanto. Sed iom post iom tiu sento malfortiĝas, kaj ju pli forte kaj serioze vi ludas, des pli ŝtonoj iĝas simplaj ŝtonoj, partioj pleniĝas je taktiko kaj strategio, sed la mita supera majstreco plu restas neatingebla.

Pri stilo

Christoph Klawe (Germanio) c.klawe@web.de

Enkonduko

Kiom da go-ludantoj, tiom da personecoj. La bazaj reguloj de la ludo estas kompreneble la samaj por ĉiuj, sed el tiuj reguloj ĉiu ludanto kreas partion laŭ sia plaĉo, kaj aŭtomate li enigas trajtojn de sia specifa personeco - tiu faras la propran stilon, kaj tial estas, ke poeta vorto por la go-ludo laŭtas 手談 („ŝudan“), laŭvorte „paroli per la manoj“.

Same kiel la parolo rivelacias la personecon de homo, ankaŭ la individua go-stilo faras. Konstanta stilo kompreneble evidentiĝas plej klare ĉe ludantoj, kiuj tre bone regas la bazajn teknikojn kaj elektas metojn komplete sendepende de hazardo. Do ekkoni specialan stilon estas ju pli malfacile, des pli malforta la ludanto estas.

Tamen ekzemple Alexander Dinerchtein, profesia 1-a dano el Eŭropo, kredas, ke eĉ 20-a kjuo jam havas propran stilon. Dinerchtein taŭge klasifikas la diversajn stilojn kiel direktitaj al gajni influon, pasiva, avara, adaptiĝkapabla, agresema aŭ la egaj variantoj de tiuj kvin.

Nepre ne maltrafu senpage eltrovi, kiu via propra stilo estas! Tiucele Dinerchtein disponigas interesan ilon sur la retpaĝo <http://style.baduk.org>.

Saĝuloj rekomendas regule kaj konscie legi tekstojn aŭ ĵurnalojn, pri kiuj vi certas, ke iliaj aŭtoroj havas tute aliajn opiniojn ol vi mem - nur tiu faro helpas vin plivastigi vian mensan horizonton.


Simile por pliboniĝi je la go-ludo estas rekomendinda regule studi partiojn de ludantoj, kiuj havas tute alian stilon ol vi mem. Sed kiel nun ekkoni la tipan stilon de famaj profesiaj go-ludistoj? Iliaj partioj kaj iliaj stiloj ofte enhavas multe pli da nuancoj ol la Dinerchtein-a klasifiko.

Mi kelkfoje pripensis tiun demandon kaj havis la ideon, kompari la specifan stilon de famaj go-profesiuloj kun la pentrarto de famaj pentristoj.

Entute ne ekzistas interna aŭ eĉ historia ligo inter la de mi elektitaj go-herooj kaj pentromajstroj, temas nur pri metodo okulfrape videbligi, pri kiu temas.

La priskribo de la stilo kaj la elekto de la rilataj pentristoj kompreneble estas tute subjektiva kaj montras nur la proponon de mi, malforta amato. Jen malmultaj koncizaj proponoj kiel ekzemploj por mia ideo:

Shusaku (1829-1862) - Hans Holbein la malpliĝa (1497-1553)



La partioj de Shusaku imponas per perfekta precizeco kaj lia kapablo adaptiĝi al tre diversaj oponentoj. Ekzistas kelkaj partioj de Shusaku, en kiuj neniu vivanta go-majstro povas trovi nur unu malbonan aŭ kritikindan meton. Ĝuste tial ĉiu serioza go-ludanto devas iam trastudi liajn partiojn.

La pentristo Hans Holbein estas plej fama pro liaj portretoj de personoj ĉefe de la angla kortumo, kie tiu germana artisto

longe vivis. Kun nekredebla ekzakteco li kaptis eĉ la plej malgrandajn detalojn ekzemple de la vestaĵoj de la portretitoj. Tiamaniere la pentraĵoj ofte superas la klarecon, kiun fotoj povus esti havintaj.

Bildo 1: Hans Holbein la malpliĝa, „Portreto de Robert Cheseman“ (1533)

Yasui Senchi Senkaku (1764-1837) - Claude Monet (1840-1926)

La fama O Senchi elstaras el la historio de goo, ĉar li unuafoje sukcesis alrigardi la teknikajn tradiciojn de la ludo per novaj okuloj. En tempo, kiam oni kutime uzis la 4-4-punkton en la angulo por komenci, li

eksperimentis kun 3-5- kaj 4-5-punktoj kaj ludis partiojn, en kiuj la atento ne estis direktita kiel ĝis tiam kutime al la randoj, sed al la centro de la tabulo. O Senchi malkovris novan vojon kompreni la ludon.

La saman oni rajtas diri en la historio de la pentrarto pri Claude Monet, kiu ekzemple okaze de la pentraĵo „Impreso, sunleviĝo“ trovis tiom novan metodon vidi la mondon kiel kunaranĝon de koloroj kaj spacoj senrespekte de la konkretaj formoj, ke tute nova epoko de pentrado, la impresionismo, estis nomita laŭ ĝi.




Bildo 2: Claude Monet, „Impreso, sunleviĝo“ (1872)

Go Seigen (1914-2014) - Maurists Cornelis Escher (1898-1972)

Go Seigen estis sendube la plej fama go-genio de la dudeka jarcento. Liaj partioj estis luditaj je tiel alta nivelo, ke oni ĉiam kvazaŭ vidas nur la pinton de la glacimonto. Kaŭze de profunda kompreno de la esenco de goo, Go Seigen kelkfoje povis flankenlasi kelkajn tradiciajn meto-sekvencojn por nur iel marki ties plej gravajn elementojn. Ofte li ofertis al la oponanto ŝajne malfortan grupon kaj okupis gravajn punktojn dum ĝi estis atakita, nur por tamen savi sian grupon lastmomente. Tre interesa estas la baza ideo de Go Seigen, ke oni devas atenti ne nur la okazaĵojn *sur* la tablo mem, sed kvazaŭ ankaŭ tion, kio okazas supre kaj malsupre de ĝi - 六合: „rikugo“, la harmonio de la ses direktoj, preskaŭ mistika koncepto. Go Seigen malgraŭ lia eminenta ludforto kaj sukceso en la famaj partidekaj dueloj kontraŭ ĉiuj liaj samtempuloj vivis tre modestan, religieman vivon.

Simile la nederlanda grafikisto M.C. Escher bazita sur plena rego de la metiaj teknikoj de la grafika arto dum sia tuta vivo kun ega



diligenteco perfektigis esplorojn pri la eblecoj de perspektivoj.

Ege imponaj estas liaj verkoj, en kiuj li ne nur desegnas aĵojn ene de la areo de la ekrano, sed ankaŭ ilian transformadon supre kaj malsupre de ĝi - iel grafika 六合, ĉu ne?

Bildo 3: M.C. Escher,

„Mirakla spegulo“ (1946)

Takemiya Masaki (1951-) - Mark Rothko (1903-1970)

La plej interesaj partioj de Takemiya estas tiuj, en kiuj li kultivis la tiel nomitan „kosman stilon“, do ege akcentis la celon gajni influon en la



centro de la tabulo. Kun la „kosma stilo“ li tre estetike eksperimentis laŭ granda konsekvenceco kaj obstino, ĉiam je la plezuro de la spektantoj kaj ŝatantoj de la go-ludo. Kiel ĉiuj ekzemploj de grandioza arto la „kosma stilo“ ŝajnas al multaj iel facile imitebla, sed estu avertitaj - ĝi fakte entute ne estas.

Laŭ simila konsekvenceco la pentristo Mark Rothko depost la jaro 1949 decidis koncentriĝi al unu- aŭ malmultkoloraj pentraĵoj, kiuj tamen havas fortan, misteran elradion.

Bildo 4: Mark Rothko, „Oranĝkoloro kaj flavo“ (1956)

Tiuj kvar ekzemploj certe sufiĉas. Eble estos temo por pluaj diskutoj pri tiu ideo en viaj lokaj kluboj, kaj tre certe vi post iom da debato eĉ trovos aliajn kaj pli trafajn komparojn.

Nun espereble estas pli facile por vi elekti interesajn partiojn por studi. Mi finfine ŝatus mencii, ke la originaloj de du el la elektitaj pentraĵoj troviĝas en la urbo Hago, Nederlando: la „Portreto de Robert Cheseman“ en la muzeo Mauritshuis, la „Mirakla spegulo“ en la speciala Escher-muzeo. Se vi foje venos al Hago, nepre kombinu la viziton de la Internacia Esperanto-Instituto (<http://www.iei.nl>) kun vizito de tiuj interesaj muzeoj!

Ŝtelistoj dum UK-oj

HORI Jasuo

Mi jam multfoje partoprenis en UK-oj. Dume mi suferis pro ŝtelistoj dufoje. La unuan fojon mia biciklo estis ŝtelita en Vilnius en Litovio. Mi kunportis malnovan biciklon kaj libere ĝuis bicikladon en la urbo. Iun vesperon mi tro multe drinkis bonan bieron, tial por mi estis ĝene meti la biciklon en la hotelan magazenon, do mi lasis ĝin en la parko kun ŝnurŝlosilo, sed ve! en la venonta mateno ĝi malaperis. Sed mi dankis al la ŝtelisto, ĉar dekomence mi decidis doni ĝin al iu, kiu volas ricevi ĝin, mi povis trovi taŭgan homon, kiu volas havi ĝin eĉ kontraŭleĝe, kaj mi ne bezonis penon por trovi ricevonton de la biciklo.

En Lille mi spertis la duan ŝteladon. En la kongresejo, ni ludis go-on en la granda salono. Vespere mi lasis la du go-tabulojn sur la tablo kaj en la sekvanta mateno ili malaperis. Troviĝis ŝtelisto inter esperantistoj! Tamen strange restis unu kesto da nigraj ŝtonoj. Tiu ŝtelisto certe estis komenconto de go kaj ne havis scion, kiel ludi go-on. Mi nun alvokas al li: “En Nitro nepre venu al la go-kunsido kaj ricevu nigrajn ŝtonojn! Mi pardonos vin, do venu inter nin kaj ĝuu go-on kune!”

Omaĝe la Ksilografo Takehanato

Nobuo Sakurai

La 28an de oktobro la ksilografo Takehanato ekveturis al eterna dormo je la aĝo 94. Lia kontribuado al Esperanto-Movado, precipe en Kansaja regiono, estas senlima, pri kies detalo oni publikigos en la revuoj Movado kaj La Revuo Orienta, do ĉi tie mi volas priskribi pri lia kontribuo al JEGA.

Lia membriĝo al JEGA originas de la fondo de la asocio. Li afablis akcepti proponon ormani kovrilon de Go-amiko per lia ksilografajo, do lia merito por nia agado estis ege granda. Mi aŭdis iam de li mem, ke li estis disĉipro de la majstro-ksilografo Munakata Sikou. Multaj liaj verkaĵoj havas varman senton kaj mi alte taksas liajn verkojn. Li havis trankvilan kaj simpatian personecon. La nombro de la numeroj de Go-amiko, kiuj havas liajn ksilografajojn sur la kovrilo kalkuliĝas ĝuste 30! Kaj liaj artikoloj aperintaj en Go-amiko nombriĝas 8.



En la fino mi esprimas mian profundan dankemon al li, ke okaze de EGLI-GO-konkurso ĉe UK en Jokohamo laŭ mia peto li afablis produkti bildkarton de lia ksilografiaĵo “La partio de Egreto kaj Kormorano” kiel donacata memoraĵo al la partoprenantoj.

竹花人さんを偲ぶ

桜井信夫

去る 10 月 29 日、竹花人さんこと竹花稔一さんが 94 歳の長寿を全うして永眠された。故人のエスぺラント界への、特に関西におけるエスぺラント運動への貢献は計り知れないものがあるが、Movado 誌や La Revuo Orienta 誌に追悼文が寄せられると思うので、ここでは故人の J E G A における貢献のみを書かせていただく。

竹花さんは、J E G A 創設以来おなじみの会員で、おなじみの版画で Go-amiko の表紙を飾っていただいたことも数知れず、J E G A にとっても忘れることのできない貴重な存在でした。竹花さんの作品は雑誌のカバーでよく見かけるが、棟方志功の弟子と言われたのを聞いたことがある。暖かみのある作品が多く、私は竹花さんの版画作品を高く評価している。とても思いやりのある穏やかな方であった。


ここに竹花さんの版画が Go-amiko の表紙を飾った号と、彼が会報に寄せた寄稿について書きとどめておく。15 号、53 号、61 号、66 号、71 号、74 号、75 号、79 号、86 号、87 号、90 号、91 号、93 号、94 号、95 号、96 号、99 号、102 号、103 号、106 号、107 号、111 号、114 号、115 号、118 号、126 号、127 号、134 号、138 号、139 号、また彼が J E G A に寄せた記事は、38 号（第 73 回世界大会〈オランダ〉参加の記）、55 号（ポーランド紀行）、59 号（中国の Go-amiko を訪ねて 1）、61 号（中国の Go-amiko を訪ねて 2）、81 号（ライマン夫妻と関西）、83 号（ベルリンとハノイの大会での囲碁活動）、86 号（第 85 回 UK における囲碁活動報告）。

最後に、特に忘れられない思い出として、また深い感謝の気持ちを込めて、横浜 UK での EGLI-Go-konkurso に際して、私からお願いして、竹花さんの版画（鳥鷺の図）の絵葉書を作成していただいて、参加者への記念品として配ることができたことを特記したい。

Go-ekzercaroj por komencantoj (10)


N. Sakurai

Kiu meto povas formi du okulojn al la blankaj ŝtonoj ĉirkaŭ-
itaj de nigraj ŝtonoj? Por vivi necesas fari almenaŭ du nefals-
ajn okulojn.




Respondo A: (bona)

B-1 faras du okulojn al la blanka ŝtonaro. Se Nigro kaptas du blankajn ŝtonojn, Blanko povas tuj rekapti.




Respondo B: (malbona)

B-1 estas malbona. Nigro metas N-2, kaj la blanka ne plu povas havi du okulojn. Do la blanka mortas.




La problemo 241-a

Nigro havas meton. Mortigu la blankan senkondiĉe.



La problemo 242-a

Nigro havas meton. Kiel la nigra ŝtonaro povas vivi?



La solvo 241-a

La blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 1-a. (La solvo) Malsupreniro N-1 estas bona. Al B-2 per N-3 la blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 2-a. (Vario) Al N-1 se B-2, sekvas N-3. La situacio estas sama al la fig. 1-a.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

Fig. 3-a. (Malsukceso) Al N-1 sekvas B-2, kaj la blanka ŝtonaro vivas.

Fig. 4-a. (Malsukceso) Al N-1 sekvas B-2, kaj same la blanka vivas.




fig 3-a.




fig. 4-a.

La solvo 242-a

La nigra ŝtonaro vivas.

Fig. 1-a. (La solvo) Vastigi la teritorion kiel N-1 estas bone. Blanko malvastigas kiel B-2 kaj enmetas kiel B-4, sed per N-5 la nigra ŝtonaro vivas.

Fig. 2-a. (Vario) Ĉe B-4 en la fig. 1-a, se B-4, do N-5 sekvas kaj la nigra vivas.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

Fig. 3-a. (Malsukceso) Vastigi la teritorion ĉe la alia flanko kiel N-1 tamen malbone. Blanko malvastigas kiel B-2 kaj enmetas kiel B-4. Kvankam Nigro metas N-5, tamen sekvas B-6 kaj post la kapto N-7

Fig. 4-a. (Sekvo) venas okulseniga B-8, kaj la nigra mortas.




fig. 3-a.




fig. 4-a.

Agadplano de JEGA

Dum la 102a Japana Esperanto-Kongreso ni havis kunsidon kaj decidis jene nian laborplanon:

1. Estraro

Reprezentanto: HORI Jasuo (s-ro)

Sekretario: MORI Hitoŝi (s-ro)

Kasisto; SAKURAI Nobuo (s-ro, Honora Reprezentanto)

2. Laborplano

(1) Kunsidoj

Novjara kunsido : 2015.1.10 en la Go-salono de s-ro Sakurai

Maja kunsido : 2015.5.14-15 en Esperanto-Domo de Jacugatake

La 101a UK : en Movada Foiro kaj en salono ni gvidos go-kurson.

La 103a Japana Esperanto-Kongreso: ni havos kunsidon.

(2) Eldono de Go-amiko

En aprilo, aŭgusto kaj decembro ni eldonas nian revuon.

Go-amiko aperos en nia retejo: <http://jega.shisyou.com/jega/index.html>

(3) Kotizo de JEGA

Japanaj membroj pagu 1000 enojn kiel la jaran kotizon. Se eblas, donacu 1500 enojn pli.

Eksterlandaj abonantoj ricevos la revuon senpage.

*Se ili volas subteni la agadon de EGLI, ili membriĝu al EGLI, pagante la jaran kotizon de 10 eŭroj al UEA-konto de EGLI.

(4) Libroj kaj go-tabuloj

Ni havas relative grandan stokon de go-libroj kaj tabuloj.





* "Invito al GO-Ludo" (maldika libro): ni senpage donacos.

* "Fundamento de Taktiko kaj Strategio de GO-Ludo" (dika libro) kun pago.

* Go-tabulo (9x9-linia) kaj ŝtonaroj: ni senpage donacos.

Serio “Raportoj el Japanio”

verkita de HORI Jasuo



Ekde la n-ro 15 ĝis la n-ro 18 de “Raportoj el Japanio” temas nur pri okazintaĵoj rilate al la Japana Katastrofo, kiu okazis en marto 2011. Per tiu raportado s-ro Hori Jasuo (reprezentanto de JEGA) plej detale sendis kaj sendas informojn pri la katastrofo inkludante la nuklean akcidenton en Fukuŝima. Eble tiuj libroj estos por la historio tre gravaj dokumentoj. Nur esperantistoj povas havi ĝojon legi tiujn informojn. Mendo ĉe HORI Jasuo.

Raportoj el Japanio 15 (eldonita en 2012) A5-formato 432 paĝoj 15 eŭroj
(elĉerpita)

Raportoj el Japanio 16 (eldonita en 2013) A5-formato 286 paĝoj 13 eŭroj

Raportoj el Japanio 17 (eldonita en 2014) A5-formato 286 paĝoj 13 eŭroj

Raportoj el Japanio 18 (eldonita en 2015) A5-formato 268 paĝoj 13 eŭroj

JEGA 第36回新春囲碁大会のお知らせ

恒例の新春囲碁大会を下のように開きます。奮って参加してください。

日時： 2016年1月10日(日曜日) 10:30～16:00

恒例の「成人の日での開催」にならず、申し訳ありません。

場所： 大崎囲碁クラブ (電話 03-3491-1349)

(JR 大崎駅下車、北改札口を出て西口へ。向かい側藤和大崎コープ4階405号室。)

会費： 2000円(当日お弁当を用意します) *年会費、寄付金も受け付けます。

出欠の連絡： メール、ファックス、電話で、堀までご返事ください。

堀泰雄 371-0825 前橋市大利根町 2-13-3

メール：horizon@water.sannet.ne.jp 電話・ファックス:027-253-2524

La 36a Novjara Go-konkurso de JEGA

Ni okazigos la 36an Go-konkurson de JEGA jene :

Dato : la 10an de januaro 2016 ekde la 10 :00 ĝis la 16:00a

Loko : Go-klubo de Oosaki (tel : 03-3491-1349)

en la ĉambro 405 en la 4a etaĝo de la apartamentaro de
Toowa-Oosaki tuj antaŭ la okcidenta elirejo de la
JR-stacidomo Oosaki en Tokio

Kotizo : 2000 enoj inkluzive de lunĉo

Kiam vi partoprenos, kontaktu Hori Jasuo (horizon@water.sannet.ne.jp)

—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—
Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会

Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会

UEA-konto: egli-f

ホームページ: <http://jega.shisyou.com/jega/index.html>

連絡先: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio

Ĉe HORI Jasuo

371-0825 群馬県前橋市大利根町2-13-3 堀泰雄方

メール: horizon@water.sannet.ne.jp 電話: 027-253-2524